PUŜI BOATON per AKVO

Puŝi la Boaton Esperanto per la Naciaj Lingvoj kiel Akvo al la Scienca kaj Teknika Oceano

Li Kexi

Parolado farita en la Esperantologia konferenco en la 76a UK en Bergen

Nun oni ĝenerale rekonis, ke Esperanto estas la ununura artefarita Lingvo, kiu povas kompetente ludi la rolon de internacia lingvo, kaj la personoj kun akrovideco ankau konsciis, ke la scienc–teknika, faka kaj profesia aplikado de Esperanto estas nemalhavebla bazo por la ĝenerala akceptigo de Esperanto kiel komuna lingvo de la tuta homaro en internacia komunikado.

Dum la lastaj jaroj fine komencis ĝermi ankau faka literaturo en Esperanto. Problemo por la verkistoj ofte estas la manko de fidindaj fakaj terminaroj, la terminojn oni ofte estas devigata kreadi pli au malpli hazarde. Precipe en la lastaj jaroj tiel estiĝis multaj duoblaĵoj kaj sinonimoj, malhelpa al faka komunikado kaj kompromitaj al Esperanto ekster la movado. Kompleta kaj internacia terminologio en Espranto estas nepra kondiĉo por la scienc–teknika, faka kaj profesia aplikado de Esperanto kaj fariĝas komune atentita, urĝe esplorenda kaj solvenda en nia movado.

La unua paŝo en la ĝusta direkto estas la rezolucio, kiun akceptis la Komitato de UEA dum la 70–a UK en Augsburg. La fondiĝo de TEC kaj ĝiaj fruktodonaj kaj sukcesplenaj laboroj estas laudindaj kaj dankindaj.

En 1987 mi publikigis la terminaron "Atlaso de Insekta Morfologio" en la tri lingvoj Esperanto, Latino kaj Ĉina; kaj en 1989, kunblaborante kun la prezidanto de la Akademio de Esperanto D–ro A. Albault, mi publikigis la terminaron "Anatomia Nomenklaturo" en la kvin lingvoj Latino, Esperanto, Angla, Franca kaj Ĉina. La praktika sperto montris al mi:

1–e, la esperantaj fakaj terminoj estu bazitaj sur la aktualaj nacilingvaj terminoj, kiuj estas internaciaj kaj ĝenerale rekonitaj kaj uzataj en la fakaj rondoj kaj agadkampoj.

2–e. en esperantigo de la terminoj la fundamento de Esperanto devas esti rigore observata, precipe la 15–a regulo de la Plena Gramatiko de Esperanto ne povas esti malatentita, nome "La tiel nomataj vortoj fremdaj, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta lau la reguloj de la lingvo Esperanto.

3–3, serkvi la ekzemplon donitan de PIV en esperantigo de la internaciaj afiksoj, uzataj en sciencoj kaj teknikoj, estas rekomendinda.

4–e, internacia kunlaboro kaj vasta diskuto inter kolegoj kaj revizio de autoritataj specialistoj estas nemalhaveblaj. Ĉi–okaze mi deziras kore danki miajn amikojn kaj kolegojn pro iliaj grandaj helpoj kaj valoraj konsiloj.

5–e, esperanta faka terminaro kun plurlingva kontrasto kaj indekso favoras al la eldonigo kaj vendo de la libro kaj diskonigo de Esperanto en la neesperantista mondo.

La supre diritaj du terminaroj "Atlaso de Insekta Morfologio" kaj "Anatomia Nomenklaturo" estas tradukoj el la latina lingvo. Kvankam la latina lingvo estas la baza internacia lingvo por entomologio kaj anatomio, tamen mia estimata amiko D–ro C. Stöp–Bowitz komentarias:

"Intertempe la scio de la latina lingvo grave malkreskis en la mondo. Hodiau por la plimulto eĉ de sciencistoj latinaj vortoj estas apenau komprenataj, sed fariĝis kvazau nuraj vortaj kodoj. Oni ne scias kiel deklinacii ilin okaze de bezono, kiel derivi en ĝusta maniero el ili vortojn por parencaj nocioj, ktp., por ne paroli pri la prononco: ĉiu emas prononcadi latinajn vortojn lau la prononcaj reguloj de sia nacia lingvo, tiel ke en prelogoj de, au en interparoloj kun alilingvaj fakuloj oni ofte malfacile rekonas

au komprenas ĝuste la terminologiajn kaj nomenklaturajn vortojn. La sola racia eliro el ĉi tiu nekontentiga situacio estas transiro al moderne internaciaj, t.e. esperantaj formoj de la terminoj".

La komentario de C. Stöp–Bowitz estas trafa kaj mi subtenas tion. Sed, kvankam la scio de la latina lingvo grave malkreskis en la mondo, tamen nunmomente la latinaj terminoj estas uzataj en la biologia kaj medicina rondoj, kaj la sistemo kaj normo de la latina terminologio estas sekvindaj. Tio estas la elirpunkto de mia transpreno el Latino en Espernton. A. Albault konstatis la transprenon kaj opiniis tion ĝusta kaj principe kaj praktike, kaj kunlaboris kun mi kaj reviziis la esperantan tradukon de la "Anatomia Nomenklatururo".

La terminaroj nur en Esperanto estas malfacile vendeblaj, tamen aldono de naciaj lingvoj povas plilarĝigi la merkaton. Dank' al la granda subteno de la Ĉina Esperanto–Eldonejo la terminaroj "Atlaso de Insekta Morfologio" kaj "Anatomia Nomenklaturo" eldoniĝis. La plurlingvaj eldonoj ricevis grandan nombron da mendoj de la ĉina ŝtata Xinhua Librejo kaj de la Internacia Libro–Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN). Pro tio, Esperanto estas diskonigita en la entomologia kaj medicina rondoj en Ĉinio kaj multaj landoj en la mondo.

Mi deziras dediĉi min al studo de la sistemigo kaj normigo de sciencaj kaj teknikaj terminoj en Esperanto kaj prilaboros la terminaron "Scienca Nomaro de Semo–plantoj" en Latino, Esperanto, Angla kaj Ĉina. Nun profitante la okazon mi min turnas al la kolegoj, kiuj regas la latinan lingvon, precipe denaske regas la anglan kaj profesie okupiĝas pri la planto–taksonomio, kun la peto ke vi kunlaboru kun mi por prilabori la supre diritan terminaron. Post la finiĝo de la konferenco mi restos ĉi tie por interparoli kun tiuj, kiuj deziras kunlabori kun mi.

Sur la vojo al la perfektigo de la scienc–teknika aplikado de Esperanto estas multaj urĝe esplorendaj kaj solvendaj problemoj kaj malfacilaĵoj. En Ĉinio estas la proverbo: "Persista frotado povas igi feran stangon en kudrilon". Mi firme kredas, ke ni certe atingos la celon.

Bibligrafio:
–C. Stöp–Bowitz, "Antauparolo " al la "Atlaso de Insekta Morfologio", Ĉina Esperanto–Eldonejo, Beijing, 1987.
–A. Albault, "Enkonduko" al la "Anatomia Nomenklaturo", Ĉina Esperanto–Eldonejo, Pekino, 1989.
–W. Dehler, "Nova Ŝanco por Terminologio", El Popola Ĉinio, 1986, n–ro 8.
–O. Haszpra, "Nova ondo – Esperanto en la sciencon", El Popola Ĉinio, 1989, n–ro 5.

Adreso de la autoro:
Vicprof. Li Kexi
Northwestern Agricultural University,
VR 712100 Yangling, Shaanxi,
CHINA.

Filozofia Revuo 18

SIMPOZIO

ENHAVO

NUMERO 18 – NOVEMBRO 1991 – JARO 9

Evaldo Pauli:
– Estu ankaŭ vi unu el tiuj idealistaj homoj! 3
Baŭmgarto Aleksandro (Rikardo Ŝulco):
– "Teoria Estetiko" – Enkondukantaj rimarkoj 6
Edgard Jamart:
– La konscio laŭ Bergson 9
Helmar Frank, Vera Barandovská, Yashovardhan:
– Kiel utile difini la nocion "interlingvistiko" 13
Willem Verloren van Themaat:
– Ĉu realisma aŭ socia-konstruisma filozofio de kono kaj scienco? 21
Epikteto (Gerrit Berveling):
– La Manlibreto de Epikteto 35

Ŝulco Rikardo:
– Kuraĝigo (sur la lasta kovrila paĝo)